

EKO 2024

TRA LA
MONDO
IRAS FORTA
VOKO

Numero 2024:13, marto 24.

Pezo: Word 40, PDF 310 KB, Alkroĉaĵo Virina Tago: 56 KB, Sume 510 KB

Gratulo de UEA pro la dekjariĝo de AMO

Okaze de la dekjariĝo de la AMO-seminarioj, mi sendas al Stefan MacGill kaj la tuta AMO-komisiono elkorajn gratulojn kaj dankojn pro la grandega laboro kiun reprezentas tiu organizado, kaj la rezultoj kiuj plifortigis la agadon por Esperanto tra la tuta komunumo. Plurajn seminariojn mi persone partoprenis, ĉiam konsciante unu el iliaj bazaj celoj: plikapabligi niajn aktivulojn por efike reprezenti nian lingvon antaŭ la publiko.

Antaŭ jardekoj, alia prezidanto de UEA, profesoro d-ro Ivo Lapenna, insiste atentigis ke la esperantistoj atentu plikleriĝi pri la lingvo, ĝia historio kaj aktuala uzado. Kiam li parolis kun junaj universitatanoj, li klarigis ke ekzistas neniu argumento kontraŭ Esperanto, kiun ne povas refuti klera, informita proponanto de la lingvo, kaj pro tio ni havas eĉ moralan devon nin prepari por pozitiva interagado kun eksteraj individuoj kaj asocioj. Parto de nia kapablo daŭrigi nian agadon por Esperanto estas konvinkiĝo pri ĝia valoro kaj la nekontestablaj avantaĝoj kiujn alportas ĝia uzado al ni persone kaj al nia mondo. AMO-seminarioj provizas platformon, en kiu per kunlaborado ni reciproke helpas nin fariĝi pli efikaj konantoj de ĝiaj kvalitoj, kaj pli efikaj laborantoj por ĝiaj idealoj.



Tra la jaroj, la edukado de nia komunumo tra la AMO-seminarioj estis plej diversa. Laŭ propra sperto kaj intereso, la fokuso povas esti kiel pli bone lerni kaj instrui la lingvon, informiĝi pri argumentoj kontraŭ Esperanto kun praktika ekzercado pri tiokiel rebati ilin, kiel labori por Esperanto en internaciaj organizaĵoj, la graveco de nia literaturo (legado kaj verkado), aŭ kiel verki proponojn por subvencioj. Tiuj neniel elĉerpas la eblojn, kiel oni povas facile konstati rigardante la temojn de la pli ol cent seminarioj jam okazigitaj. Aktivula Maturigo: ĉu necesas? Kompreneble. Ĉu sukcesis? Juĝu la partoprenintoj, sed mi mem multon lernis de interagado kun profesiuloj kaj dediĉitaj spertuloj pri la kampoj esploritaj. Ni daŭre utiligu niajn seminariojn por trejni niajn aktivulojn, kiuj siavice instruu aliajn kaj helpu pliefikigi ĉies laboron por nia lingvo.

Fine elkoran dankon denove al Stefan kiel ĉefa AMO-organizanto, kaj al ĉiuj kunlaborintoj kaj partoprenintoj, kaj ni atendu la daŭrigon de konsciiga programo kiu plisolidigis nian movadon kaj la kapablojn de nia komunumo. AMO kontribuas al ĉiuj kolonoj de la nuna strategia planado de UEA, KIRI: Kunlaborado (necesa por

seminario kaj ĝiaj rezultoj!), Informado (evidente), Rilatoj (kun eksteruloj), kaj Instruado. Do eksterdube, plej kerna parto de nia laboro!

Duncan Charters, Prezidanto, Universala Esperanto-Asocio

La ekster-rilataj planoj de UEA

Ni lastatempe ricevis informon, ke la estrarano de UEA pri UN-agado, François Lo Jacomo, vizitos Novjorkon meze de aprilo. Ni fiere bonvenigos lin.

Nia ĉefa iniciato en la monato majo estos la Civilsocia Konferenco, kiu okazos en Najrobio. Temas pri konferenco de neregistaraj organizoj kunvokita de la Departemento de UN pri Monda Komunikado (UNDGC). Reprezentos UEA Mana Brinson Namutema (Kongo DR) kaj Anny Joanice Nizigiyimana (Burundo).

Ni antaŭvidas, ke en junio okazos la jara Simpozio de la Studogrupo pri UN kaj Lingvoj, kiun kunvokos (virtuale) malgranda grupo de fakuloj sub gvido de Francis M. Hult, unu el la reprezentantoj de UEA al UN. Ni sendos al vi informojn baldaŭ.

Alkroĉita estas la mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Virina Tago 2024, en du formoj: kiel Gazetara Komunikado de UEA kaj kiel trilingva (Esp, Franca, Angla) sendaĵo al UN. Bonvolu utiligi ĝin en via ekstera kaj interna informado.

Humphrey Tonkin

Buntkoloro en la nepala ĉefurbo

La Monda Socia Forumo 2024, kiu okazis en Katmanduo de la 15-a ĝis la 19-a de februaro, kunigis aktivulojn el la tuta mondo sub la temo 'Alia Mondo Eblas.'; Katmanduo, kun sia riĉa etna diverseco, funkciis kiel vivoplena fono por la monda kunveno, kunigante voĉojn kontraŭ maljusteco kaj defendante pli justan mondon.

Mirejo Grosjean

Reaktiviĝis landa asocio en Madagaskaro

Ranja Lydie ZAFINIFOTSY, estas la nova prezidantino de la Landa Asocio en Malagasio. Ŝi skribas: "Mi prenas ĉi tiun rolon kun granda respekto kaj fervoro por pliigi la entuziasmon kaj partoprenon en nia asocio. Nia asocio nun havas kelkajn novajn membrojn - 25 virinoj kaj 14 viroj". Estas gajigo vidi la kreskon de nia familio kaj la diversajn spertojn, kiujn ĉiuj novaj membroj alportas al nia komunumo. La aldono de tiuj novaj membroj pliigos nian kapablon atingi niajn celojn kaj krei ankoraŭ pli dinamikan kaj diversecan komunumon. Ni havas grandan esperon pri la estonto kaj la potencialo, kiun ĝi alportas al nia asocio.

Virina agado en Benino

Komence de marto 2024, okazis en la porknabina Liceo de Lokossa, la unua kurskunveno kadre de la projekto pri pura virina agado fare de la NRO Infanoj Ĉirkaŭ Afriko. Sekve de la propagando okazinta lundon, la 5-an de februaro 2024, aliĝis 74 knabinoj, el kiuj efektive ĉeestis la kurson 62.

Aldoniĝis grupo da 56 knabinoj dumkurse pretekste, kiuj tute ne estis informitaj pri la afero antaŭe. Entute vizitis la kurseton 118 knabinoj el diversaj klasoj de la Liceo.



Latifou Gbadamassi

Ekspozicio pri Zamenhof migras tra Litovio

Dankon pro la publikigo de la informo pri BET-59 en Kaunas. Ankoraŭ unu peto. Bonvolu publikigi ankaŭ tiun-ĉi informon pri migranta Zamenhof-ekspozicio en Litovio:

<https://sezonoj.ru/2024/02/litovio-70/>

Povilas Jegerovas

Universitata kurso en Ĉinio

La redaktoro de edukado.net informas vin, ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Pekina Lingva kaj Kultura Universitato
Gvidantonomo: CHEN Ji, Aldoninto: zhaovenk
Tipo: Trimonata universitata kurso
Loko: Pekino. Ĉinio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27625> kaj plie ĉe:

<https://mp.weixin.qq.com/s/-eTu4gJ0aGn5k4wEpmuutg>

Nova broŝuro pri la urbo Graz en Aŭstrio

Bonvole mendu tiun broŝuron ĉe: Graztourismus Information:
Ne forgesu indiki vian poŝtan adreson. La broŝuro kostas por vi nenion!
info@graztourismus.at. **SMG**: Pluraj personoj jam mendis ĝin.

Walter Klag

SMG memoras prospekton pri Graz, kiu konvinkis lin tranokti en la urbo en 1973 post la UK en Beogrado kaj la IJK en Sarajevo.

Hungara heroo de medicina progreso



La redaktoro de edukado.net informas vin, ke aldoniĝis nova ero ĉe Instrumaterialoj.

Titolo: Kiu estis doktoro Ignaz Semmelweis?

Kategorio(j): Aŭd- kaj Legokomprena.

Verkinto(j): Katalin Kovats

Temo: Komprenekzerco laŭ artikolo ĉe <uea.facila>

Tipo: Ekzerco je nivelo B1, B2

Legu ĉe: <https://edukado.net/instrumaterialoj?iid=23765>

===== vortoj: 1005 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikoj estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

La unuaj dek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigoj, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.